

KAPITALO

numero 151 (1996:1)

LA LASTA TRIVMFANTO DE LA ROMIA IMPERIO



Vizitu kun ni
Archeon

Venis la horo ekagi kontraŭ
LA PLEJ MALNOVA KRIMO DE LA MONDO



La plej malnova krimo de la mondo	Rathavary Duong, Koreio	2
La lasta triumfanto de la romia imperio	Geoffrey Greatrex, Kanado	4
Felip Artero i Lozano	Redakcio	6
Farbado de ovoĵ	Rumanio	6
Trompitaĵ trompistoĵ	Kizeyidioko Mayinda, Zairio	6
Krucvorto	Sfinksido, Francio	7
Archeon – Vizito al la pasinteco	Marcus Sikosek, Nederlando	8
Plej efika lingvometodo	May Bijleveld, Brazilo	10
Kial Dolomitoĵ aspektas rozkolore?	Giancarlo Baraldi, Italio	11
Zuna	Ba Yankui, Ĉinio (trad. Xu Jinming)	12
La malbenita templo	Irina Aleksejeva, Rusio	13
La bona ingo		14
Misio en Galapagoĵ	Sid Kane	14
Du novaj serioĵ	Antonio Valén, Hispanio	15
Kiel verki per facila lingvo?	Anna Löwenstein	16

KONTAKTO

Dumonata socikultura gazeto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), eldonata de Universala Esperanto-Asocio (UEA)

Fondita en 1963

N-ro 151 (1996:1), 33-a jarkolekto

ISSN 0023-3692

Legata en 90 landoj

Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando;

☎ +31 10 436 10 44

☎ +31 10 436 17 51

✉ uea@inter.nl.net

Redaktoro: Francisco L. Veuthey

Konstantaj kunlaborantoĵ:

Irina Aleksejeva (Rusio)

Felip Artero i Lozano (Katalunio)

Zoran Ćirić (Serbio)

Alberto García Fumero (Kubo)

Claus Günkel (Germanio)

Kizeyidioko Mayinda (Zairio)

Atilio Orellana Rojas (Argentino)

Qshô-Davies Oluwábúnmi (Niĝerio)

Anna Rachoń (Pollando)

Uatanabe Kei (Japanio)

Grafika elpretigo: Roy McCoy

Provlegado: Rob Moerbeek


Presado: Grafisch Bedrijf Tuijtel

Facilingvaj artikoloĵ estas verkita en la niveloj tre *facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de KONTAKTO. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujara.

Anonctarifo:

Tutpaĝa 780 gld., duonpaĝa 430 gld., kvaronpaĝa 240 gld., sesonpaĝa 185 gld., okonpaĝa 130 gld. Eksterakvoriĵaj anoncoĵ kostas duoble. Sensange ripetita anonco (ne anoncetoi!) en sinekvaj numeroĵ rajtas je rabato de 20%. Por movadaj instancoĵ: 50% rabato. Varbantoĵ de ekstermovadaj anoncoĵ ricevas maklerajon de 30% el la prezo de la konkerna anonco. La abontarifo varias laŭlande. Petu informojn de la supra adreso.

Malfortvidantoĵ povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise Lauwen, Neerstraat 165, NL-5215 AP 's-Hertogenbosch, Nederlando.



enkonduko

Ekde tiu ĉi numero vi havos la eblon konatiĝi kun niaj konstantaj kunlaborantoĵ, la veraj kontaktistoj ... Al ili grandparte ŝuldiĝas, ke ĉiun duan monaton KONTAKTO venas al via leterkesto plena de legindaĵoj. La rubriko kontaktisto, kiun malfermas Felip sur paĝo 6, estas ankaŭ agnosko kaj saluto al ili.

Tra la pasinta jaro vi povis vidi konstantan anoncon direktitan al malfortvidantoĵ kaj blinduloĵ pri havebleco de KONTAKTO sur kasedoj. Tiun voĉlegan laboron ni dankas al ĝia iniciatinto, Elise Lauwen el Nederlando, kiu sindone kaj sen ricevi honorarion voĉlegas tutajn numerojn, registras kaj dissendas la kasedojn. Se vi konsa esperantistan vid-handikapiton, sugestu al tiu ricevi nian gazeton tiamaniere. Tiu servo estas senpaga kaj la nura kondiĉo estas, ke la ricevanto mem sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise. Bonan 151!

Francisco

La plej malnova pr

“Venis la horo, ke la registaraj gvidantoĵ kaj la publiko agnosku prostituadon kaj ties ruinigajn efikojn sur la homoj. Anstataŭ provi distingi inter “memvola” kaj “trudita” prostituĝo, ili devus klare laŭti kaj entrepreni kontraŭagon!”

La enkondukaj linioj estis la unuanima opinio de internacia komitato de spertuloĵ, kiu renkontiĝis en Seulo (Korea Respubliko) de la 12-a ĝis la 15-a de junio laŭ la invito kaj de la Instituto por Disvolviĝo de Koreaj Virinoĵ kaj de Unesko.

“Unuafoje en la historio virinoĵ kapablas organizi, konsideri, skribi kaj kompreni ĉi-specan problemon. Temas pri la revolucio de la jarcento,” diris Wassyla Tamzali, Unesko-kunordiganto por virinaj aktivaĵoj. “Tial ili havas la historian respondecon denunci tiun ĉi plagon, kiu viktimitis virinojn dum jarcentoj kaj nun atingas pli kaj pli da infanoĵ kaj viroĵ.”

Post kvar-taga diskutado la ĉirkaŭ 30 partoprenantinoĵ kompilis la “Seulan Deklaron por mondo sen seksa ekspluatado” kaj agadplanon prezentotan en diversaj mondaj forumoj.

En la nomo de moralo

Dum seks-komerc ne en ĉiuj socioĵ estas konsiderata tabua, feministoj kaj humanismaj organizaĵoj en la tuta mondo ĝenerale oponas al ĝi en la nomo de moralo. “Sed ĉi tia kondamno ofte kuraĝigas la potencialajn klientojn”, diris Tamzali.

Tial la seula renkontiĝo turnis sin al la etikaj dimensioĵ implicitaj. “Ĉiuj formoj de seksa ekspluatado estas neakordigeblaj kun la homa digno, kaj tial perfortas fundamentajn homajn rajtojn”, laŭ la Deklaracio, “senkonsidere al la aĝo, sekso, raso, etno aŭ socia klaso de la viktimo”. Malmultvorte, kontraŭe al la ofta kazo, ni ne “engettoigos” prostitutojn pro moralaj aŭ san-rilataj kaŭzoĵ. “Ni luktas por savi bestojn. Ni luktas por konservi la medion... Kial ne lukti por homoj?” diris Tamzali dum ŝi insistis, ke ni taksu la seksan komercon kiel ekvivalenton de sklaveco.

Finfine, nur kiam sklaveco estis rigardata kiel atako al la homa digno, ĝi iĝis tabuo. Ni ankaŭ bezonas demandi nin kiel prostituado komencis ligiĝi al sekso. “Pri kia sekso ni parolas? Kies sekso? Kaj kial?” demandis Cecilia Hofmann de la Koalicio Kontraŭ Virina Komerc (Filipinoĵ). Prostituado estas pure kaj simple ago de perforto, la pinta esprimo de socio regata de viroĵ, insistis s-ino Byun el Koreio. “Ne temas pri individua malbonŝanco sed pri integra parto de patriarka sistemo, kiu ebligas la uzon de sekso kiel ilon de perforto kaj povo.”

GAMMA



— Rathavary Duong, Koreio

Animvarbado

Nenio el tio implicas, ke virinoj devas esti kontraŭstarigataj al viroj. Male, la partoprenantoj emfazis, ke ili devos lukti kune por konservi sian komunan dignon. Sed virinoj ja bezonas engaĝiĝi en iom da anim-varbado. “Ni devas ŝanĝi nian pensmanieron”, diris belga advokato Michèle Hirsch. “Kiel ni devus reagi se ni scius, ke unu el niaj filoj vizitas prostituiton? Ĉu ni devus trakti lin kiel krimulon? Ni ofte montras ian tolereman komplicecon al knaboj. Tio respegulas, kion mi nomas “prostitua rilato”, profunde kuŝanta en nia subkonscio”.

En Kostariko, ekzemple, knabo iĝas viro en la brakoj de prostituitino. En Vjetnamio, la samaj virinoj, kiuj svingis fusilojn en la milito, nun rezignacias gajnante sian panon kiel prostituitinoj. “En mia lando, obeemo estas esence virina trajto”, diris d-ro Duong Quynh Hoa.

Kunrolas ankaŭ grava ekonomia faktoro envolvita, aparte por disvolviĝantaj landoj. La mono sendata de enmigrintaj prostituitoj al siaj familianoj ofte atingas konsiderindajn sumojn en la malriĉeco de kelkaj aziaj kaj afrikaj landoj. Ankaŭ en tiuj landoj mem prostituiĝo estas kuraĝigata, kun turistoj de bonfartaj landoj speciale venantaj por ĝui la avantaĝojn de la “servoj” provizataj de junaj homoj kaj infanoj.

Fakte, la seksa komerco iĝis granda negoco. En Filipinoj turismo kreskis 30% inter 1972 kaj 1977, dank’ al la dinamismo de sektoro oficiale nomita “gastama industrio”, doninta al prostituitinoj respektindajn titolojn, kiel “oficistinoj de gast-rilatoj”. Ĉio estis farita por altiri klientojn, inkludante afiŝ-seriojn montrantaj Miss Universe (1973) kun la loga legaĵo: “Estas aliaj tie, de kie ŝi venas”.

La Seula Deklaracio malkaŝas la veron klare denuncante la “uzon de la termino ‘komerca seks-laboristo’ kaj la fakton ke kelkaj landoj, internaciaj agentejoj kaj aliaj instancoj kvalifikis prostituiĝon kiel ekcepteblan laboron.”

La partoprenintoj pridiskutis ankaŭ la pli subtilajn manierojn laŭ kiuj seksa ekspluatado estas sankciita. Ekzemple, en kelkaj eŭropaj landoj, pornografio estas abunde montrata en librovendejoj kaj kioskoj en la nomo de ĵurnalisma kaj gazetara libereco. Sed tiu pravigo estas nenio alia ol vitrino por “multmiliard-dolara pornografia industrio”, kiu “erotikigas seksan mallegecon kaj ordinigas la seksan performon”, laŭ la vortumo de la Deklaracio.

En kelkaj landoj, prostituado estas reklamaĉata kiel esprimo de

seksa liberiĝo kaj konsiderata “la plej malnova profesio de la mondo”, implicanta senton de persona liberiĝo. Sed por la spertuloj, tiu ĉi speco de intelekta raciigo “maskas la potencan socian, ekonomian, politikan kaj kulturen fortojn, kiuj puŝas la homojn al prostituado.”



“Ne la prostituitoj devas esti punataj sed la perantoj, ejo-posedantoj kaj klientoj. Malfeliĉe, tio ĉi estas ankoraŭ for de tutmonda akceptiĝo.”

NANDIR FILMREALIGOJ
CP 1258 - Lausane - Suisse

Laŭzana Esperanto-Societo
PK 389 - 1009 Pully - Svislando

...proponas al vi tri novajn vidbendojn...



La laŭzana polico
... prezentas sin

Pro siaj 126000 loĝantoj, la ĉefurbo de la Vaŭda kanton staras hodiaŭ je la kvina vico inter svisaj loĝlokoj. Laŭzano nombras 380 policistojn. (30 min.)



LA EGA KESTETO
POLICA FILMO 7-LINGVA

Ĉi tiu scenara polic-filmo, en kiu aŭdiĝas 7 lingvoj, inkluzive de Esperanto, ilustras aspekton de la nuna vivo en Svislando, kie komunikado ofte okazas miks- kaj mis-lingve. Tiu ĉi fikcia filmo ricevis la duan premion en la Belartaj Konkursoj de UEA en 1995. (30 min.)



TAMPEREEO 1995
Kongresa filmo

Dum la UK 1995 en Tampere (Finnlando), la kameraisto filmis la ĉefajn partojn. Li muntis ilin senkomente; la bildoj kaj etoso parolas per si mem. (60 min.)

(Ne forgesu precizigi la sistemon de via aparato: PAL, SECAM aŭ NTSC.)
La vidbendoj estas mendeblaj ĉe la Libroservo de UEA.
Prezo de unu kasedo: 66 gld. Prezo de la 3 kune: 180 gld.
Aldoniĝas 10% por sendo kaj, en EU, 17,5% por imposto.

La renkontiĝo ankaŭ fokusis la alian flankon, vidatan en landoj, kie neniu provo estas farita por leĝigi aŭ legitimigi la seksan komercon. Rezulto: prostituitoj estas traktataj kiel krimuloj. En Suda Koreio, ekzemple, ili povas esti arestitaj de la polico kaj tuj kondukataj al centroj de reedukiĝo, kie ili restas detenitaj de 6 ĝis 12 monatoj sen ia ajn jura formalajo.

Ambaŭ tiuj ĉi alproksimiĝoj estas riproĉindaj, diris la spertuloj. Ne la prostituitoj devas esti punataj sed la perantoj, ejo-posedantoj kaj klientoj. Malfeliĉe, tio ĉi estas ankoraŭ for de tutmonda akceptiĝo. Ekzemple, la partoprenantoj referencis la novan punkodon de Hispanio, kiu, ili diris, akceptas tiajn ekspluatantojn kun certa legitimeco.

Sed fojon plian, necesas singardemo: Forte subpremaj leĝoj povas senigi prostituitojn de loĝejo, se la edzo aŭ kompano estas aŭtomate rigardata kiel prostituanto.

Kelkaj gajnoj estas atingitaj, tamen, kun novaj leĝaj aliroj akceptitaj en landoj kiel Aŭstralio, Usono, Germanio, Norvegio kaj Svedio, kie pedofilio revenintaj hejmen post engaĝiĝo en neleĝaj rilatoj eksterlande estas persekutataj.

La prezo de postvivado

La seula renkontiĝo finiĝis kun kelkaj konkretaj proponoj. Partoprenantoj sugestis krei ĉe Unuiĝintaj Nacioj konstantan laborgrupon pri prostituado kaj seksa ekspluatado. La grupo estu respondeca disvolvi novajn leĝajn instrumentojn por refortigi la Konvencion de 1949 pri homkomerco kaj prostituado de aliaj. Ili ankaŭ alvokis UN adopti ĉarton de homaj rajtoj, sistemon por moniti misuzojn kaj komisionon respondecan provizi urĝan asiston al la viktimoj — ĉar tiuj, kiuj postvivis, pagas la prezon de multoblaj postefikoj, ofte fizikaj, sed ĉiam psikaj.

Fine la partoprenantoj insistis, ke la seksaj leĝrompantoj estu punitaj ĝuste kiel militkrimuloj. “Ĉar”, diris Tamzali, “kion ni alfrontas tie ĉi estas, nepre, milito.”

(El UNESKO SOURCES n-ro 71, julio aŭgusto 1995)


BELIZARO

LA LASTA TRIVMFANTO

DE LA ROMIA IMPE

GEOFFREY GRE

DEKLARIS
 KLERULO: "ĈIUJ SCIAS
 ALMENAŬ UNU FAKTON
 PRI LA ROMIA IMPERIO – KE
 ĜI DEKLINIGIS KAJ FALIS." SED
 ĈU TIU "FAKTO" VERAS? EFEKTIVE,
 EN LA LONGA DAŬRO, JES. TAMEN,
 LA ĈEFURBO DE LA ROMIA IMPERIO
 (T.E. DE LA ORIENTA ROMIA IMPERIO),
 KONSTANTINOPOLO, FALIS NUR EN LA
 JARO 1453 POST KRISTO, DO TEMAS
 PRI EGE LONGA KLINIĜO! PLIE, EN LA
 SESA JARCENTO P.K. ŜAJNIS, KE LA
 ORIENTA ROMIA IMPERIO REKRES-
 KOS KAJ RENVERSOS LA DEKLI-
 NIĜON – DANKE ĈEFE AL LA
 RIMARKINDA GENERALO
 BELIZARO.





Ne multaj scias pri la reviviĝo de la romia imperio en ĉi tiu periodo. Homoj ĝenerale preferas rakonti pri la invadoj de la barbaroj en la kvara kaj kvina jarcentoj: inter ili estis gotoj, vandaloj kaj hunoj, kaj aliaj, pli etaj triboj. Tiuj tiel nomataj barbaroj (krom la hunoj) sukcesis detruai la okcidentan romian imperion kaj dividis ĝiajn provincojn inter si. Do troviĝis gotoj en Hispanio (t.n. visigotoj) kaj Italio (t.n. ostrogotoj), frankoj en Francio (ne surprizinde) kaj vandaloj en Afriko. Tie ili regis la indiĝenajn popolojn en romia stilo, uzante la latinan lingvon; sed, kvankam ili estis kristanoj, ili ne estis ortodoksaj kristanoj (katolikoj), malkiel la romianoj, kiujn ili regis, kaj kiuj daŭre troviĝis en la orienta imperio.

JUSTINIANO

Tian situacion — ke herezuloj regu ortodoksajn kristanojn — ne povis toleri la (orienta) imperiestro Justiniano. Li fariĝis la sola reganto de la imperio post la morto de sia onklo Justino en 527 p.K., kaj tuj ekaktivis en multaj kampoj samtempe. Ekzemple li ordigis kaj kodigis ĉiujn romiajn leĝojn: la “Justiniana Kodo” pro tio tiel nomiĝas. Li kaj lia edzino Teodora samtempe

Generalo Belizaro kaj Imperiestro Justiniano (maldekstre) kaj imperiestrino Teodora (ĉi-dekstre), gvidaj homoj de la lasta periodo de la Romia Imperio, reliefigas sur impona mozaiko de la sesa jarcento en la preĝejo de Sankta Vito (Raveno, Italio).



strebis solvi la disputojn, kiuj furiozis inter kristanoj en la orienta imperio. Kaj, post paca traktato kun la nova persa reĝo Kusro la 1-a (531-579 p.K.) kaj grandega tumulto en Konstantinopolo (en januaro 532), li lanĉis ekspedicion al norda Afriko por forigi la vandalojn.

Ne multaj opiniis, ke tiu ekspedicio sukcesos: tiel rakontas la ĉefa historiisto de la militoj de Justiniano, Prokopio de Cezareo (Palestino). Tiu historiisto akompanis generalon Belizaro en multaj liaj kampanjoj, kaj informas nin, kiom timis la generalo kaj liaj soldatoj antaŭ ol ili atingis hodiaŭan Tunizion. Belizaron ankaŭ akompanis lia edzino, Antonina, kiu (rakontas Prokopio) neniam hezitis amindumi kun aliaj viroj; ŝia edzo, tamen, rifuzis kredi la veron, kaj konsentis fari kion ajn ŝi petis (almenaŭ laŭ Prokopio).

LA BATALOJ

Alveninte al norda Afriko, la romianoj tuj hastis al la ĉefurbo de la provinco, Kartago, kaj venkis la vandalojn survoje. Post tiu venko Belizaro neniam malvenkis kontraŭ iu ajn malamika armeo. La sola obstaklo al liaj sukcesoj estis Justiniano mem, kiu enviis liajn sukcesojn kaj timis, ke li kronos sin imperiestro; pro tio li baldaŭ revokis lin el norda Afriko al Konstantinopolo. Tie li celebris la lastan formalan triumfon en la romia historio: dum duon-jarmilo neniam vidiĝis tia ceremonio, kiam prezentiĝis kaptitoj, inkluzive la vandalan reĝon, Gelimero, kaj trezoroj reportitaj. Inter tiuj trezoroj notindas hebreaĵoj, kiujn unue forprenis la romianoj el Palestino en la unua jarcento p.K. kiam ili detruis Jerusalemon. En la mezo de la kvina jarcento p.K., la vandaloj forrabis ilin el Romo kaj portis ilin al Kartago; kaj nun rekaptis ilin la romianoj!

Post tiu tiom rapida sukceso, la imperiestro decidis forpeli la (pli fortajn) ostrogotojn el Italio. Denove li sendis Belizaron al Italio, kaj inter 535 kaj 540 li rekonkeris la tutan italan duon-insulon ĝis Raveno, kie kapitulacis la gota armeo. Dum la milito Belizaro sukcesis defendi

la urbon Romo kontraŭ multe pli granda gota armeo en sieĝo, kiu daŭris pli ol unu jaron (537-538). Neniam denove Belizaro spertis tiom grandajn sukcesojn. En 540 li revokiĝis al la ĉefurbo, Konstantinopolo, kaj preskaŭ tuj sendiĝis al la orienta flanko de la imperio, en hodiaŭa Sirio, por defendi kontraŭ invadantaj persoj. Kvankam poste Justiniano denove lin sendis al Italio, li rifuzis doni adekvatajn armeojn, kaj Belizaro povis preskaŭ nenion fari kontraŭ la revigliĝantaj gotoj. Do post tiom flora kariero, dum kiu li lojale kaj sindone sekvis sian imperiestron, li revenis al Konstantinopolo por emeritiĝi.

FINA SUKCESO

Restis unu fina sukceso por la generalo. En la jaro 559 aperis armeo de aliaj barbaroj, kiu minacis la ĉefurbon mem. La romia armeo, kiu devis defendi la urbon, venkiĝis. La imperiestro preskaŭ perdis la es-


peron, sed fine sin turnis al la maljuna generalo, kiu tiom bone lin servis en sia juneco. Belizaro tuj obeis, malgraŭ sia aĝo (proks. 60), kaj pretiĝis armeon — sed en ĝi troviĝis nur eks-soldatoj kaj urbanoj! Kiam ili aŭdis, ke Belizaro estos la generalo, ili regajnis esperon kaj venis amase por lin servi. Kosciante, ke lia armeo neniel povus venki la barbarojn en ordinara batalo, li per ruzo embuskis, kredigante ilin, ke li posedas grandan profesian armeon. Post ioma rezisto ili formarsiis rapide. En marto 565 Belizaro mortis kaj post kelkaj monatoj sekvis lin Justiniano. Ne multe poste la romianoj denove perdis Italion kaj nordan Afrikon — kaj neniam ili regajnis. □

Pliajn informojn pri Belizaro kaj la romia imperio en la sesa jarcento vi trovos en la verkoj de Prokopio. Mi aparte rekomendas la *Sekreta Historio*, en kiu Prokopio malkaŝas la maldecajn agojn de la imperiestro Justiniano kaj la imperiestrino Teodora (kaj de la edzino de Belizaro). Inter modernaj verkoj menciindas la libro *Justinian* de John Moorhead (Londono, 1994) kaj *Die Spätantike* de A. Demandt (Munkeno, 1989).

NOVA tejo-VARBILO!

tejo ĵus eldonis 8-paĝan faldfolion tre allogan, kiu informas pri la avantaĝoj membri en **tejo** kaj pri la manieroj kontribui al ĝi. Enhave redaktita de Thomas Pusch, ĝi venas kun fotoj kaj grafiko de Franĉjo Veuthey, por kiu pozis brazila esperantisto, Clay Magalhães. Dukolore presita en A6-formato (10cm. x 15cm.), grandaj literoj kaj dinamika teksto-sinsekvo.

Se vi deziras ricevi ekzemplerojn por distribuo, turnu vin al **tejo**. Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.



En la nordo de Rumanio troviĝas regiono al kiu la fag*-arbaroj donas sian nomon: Bukovino aŭ "Faglando", komuna hejmlando por rumanoj kaj etno* parolanta formon de la ukraina lingvo. La ĉirkaŭaj popoloj nomas iliajn anojn *rutenoj*, sed ili nomas sin *hucanoj*; tiel ĉi nomas ilin ankaŭ la rumanoj. Kiel montaraj loĝantoj, ili vivas longe de la al-flu-aĵoj, inter la arboj kaj sur la flankoj de montetoj. La viv-kondiĉoj permesas al la vilaĝanoj sin okupi nur pri best-bredado* kaj arbo-prilaborado. Sed la pli-parto foriras al aliaj enlandaj regionoj por gajni monon kiel laboristoj. Dum la malvarmaj monatoj la virinoj utiligas la tempon per brodado* kaj farbado* de ovoĵ. Veraj ovoĵ de hejmaj birdoj.



breĉi: teni kaj plimultigi bestojn

broĉi: desegni per fadenoj

etno: homa grupo kun samaj sociaj kaj korpaj ecoj

fago: arbo, kies lignon oni uzas por mebloj

farbi: kolorigi

koko: birda "vek-horloĝo"

kruko: +

Pasko: festo, kiu memorigas la reviviĝon de Jesuo

vundo: korpa tranĉo aŭ frapo

Farbado

Kontaktisto

Felip Artero i Lozano


"kulpas" pri multaj el la bonegaj ilustraĵoj de *KONTAKTO*. Jen li manĝanta haringon en Roterdamo laŭ la holanda maniero.

Kiuj konas tiun ĉi andaluzidan katalunon asertas, ke kun li eblas realigi ion ajn, sed veki lin estas senespera entrepreno; ne senprave li mem difinas sin "siestisto"!

Aktivulo de la kataluna E-movado i.a. kiel redaktoro de *KATALUNO*, Felip lastatempe civil-servis helpante bosniajn rifuĝintojn en Kroatio.

Krom en la suna Barcelono, kie tiu ĉi katemulo kutime gvatas, eblas trovi lin en IS.

Dankon pro via fantazio, Felip!



Trompitaj trompistoĵ

facila

— Kizeyidioko Mayinda, Zairio

Maskulu ne estis ŝatata en sia vilaĝo. Ĉiuj sciis, ke li estas mallaborema kaj ŝtelema. Neniu plu volis paroli kun li. Li estis devigita foriri de tiu vilaĝo. Antaŭ ol forlasi ĝin, li plenigis sakon per ĉifonoj* kaj metis supren iom da salo. Lia sako estis tiel bone aranĝita, ke oni povis kredi, ke temas pri salosako. Li deziris vendi sian sakon bonpreze.

En iu alia vilaĝo Mafuta, granda kaj danĝera knabo, ankaŭ estis forpelita. Li havis la saman ideon kiel Maskulu, sed anstataŭ salo li metis kapotukoĵn supre de sia sako.



admiri: sperti altan senton pri la bonaj ecoj de iu

bazaro: komuna loko, kie estas multaj vendolokoj aŭ vendotabloj

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO! fariĝu patrono de TEJO

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- *Kontakto*;
- *TEJO tutmonde* (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikakojn.

Laŭ la kristana tradicio la unuaj farbitaj ovoĝoj estis tiuj de Maria Patrino de Jesuo aŭ alia Maria alportinta ilin sub la krucon* de Jesuo. Sang-eroj el la vundoj* de la Savanto ruĝ-igis la ovojn en la korbo. De tiam en la Pasko*-tagoj virinoj donacas al siaj konatoj kaj amikoj ovoĝojn farbitajn. Sed en Bukovino la ovofarbado iĝis arto.



La ovoĝoj estas plurkoloraj farbitaj kaj oni desegnas bildojn sur ili. Temas pri kolekto de signoj en nombro de 24, inter kiuj voĵo, kok*-inkapo, kruco, floroj, arb-folio, steletoj. La ĉefaj koloroj kovrantaj la ovosupraĵon estas ruĝo, verdo, flavo (simbolo de la kamp-riĉeco), bluo, blanko (simbolo de ostoj) kaj nigro (simbolo de morto). La ovoĝoj pentritaj de rumaninoj diferencas de tiuj de hucaninoj per la ĉefkoloro: verda ĉe la unuaj, ruĝa ĉe la lastaj.

Junaj knabinoj lert-igis en tiu ŝat-okupo sub la gvido de siaj patrinoj kaj avinoj. Ankaŭ la gejunuloj, kiujn vi vidas sur la foto, praktikas tiun arton. Sed ion ili ne povas fari: sendi perpoŝte la kolorajn ovoĝojn al siaj Esperanto-amikoj!



facila

SUR OVOĜOJ

Ambaŭ friponoj* renkontiĝis ĉe akvofonto. Lacegaj, ili kuŝis unu apud la alia kaj komencis konversacii.

“Kio estas via okupo?” demandis Maskulo.


“Mi estas vendisto. Mi vendas kaptukojn. Mi iras al la granda bazaro* de la urbo, ĉar mi deziras aĉeti salon per la mono, kiun mi ricevos de miaj vendadoj. Poste mi revendas tion en la vilaĝo.”

“Kia bonŝanco!”, diris Maskulo. “Ankaŭ mi estas vendisto kaj havas vendotan salosakon. Ni faru interŝanĝon. Donu al mi viajn kaptukojn kaj mi donos al vi mian salon”.

“Konsentite”, diris Mafuta. Kaj interŝanĝinte siajn sakojn, ili forlasis unu la alian, ambaŭ konvinkitaj pri la bona negoco* farita. Ili rapide marŝis. Ĉiu timis, ke la alia rimarkos la trompon*. Kiam la friponoj estis malproksime, ili malfermis sian sakon por admiriri* la riĉaĵojn. Ilia ĝojo ne estis longdaŭra.



ĉifono: for-ĵetinda peco de vestaĵo
fripono: fi-ulo
negoco: komerco
trompi: fari malverzaĵon



La Jarlibro akompanos vin tra tuta jaro... donu taŭgan veston al ĝi!

UEA ofertas elegantan bonkvalitan platan kromkovrilon por via Jarlibro. Mendu ĝin kontraŭ 1,80 gld. (+ afranko kaj, ene de EU, imposto de 17,5%). Triona rabato ekde 3 ekz.

Krucvorto

— Sfinksido, Francio

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1									
2							■		
3				■	■	■			
4		■							
5					■				
6								■	
7				■	■	■			
8			■						
9									

Sendu vian solvon al nia redakcio antaŭ la 30-a de junio 1995.
Inter la partoprenintoj ni lotumos ASTERIKS GLADIATORO. Rapidu!

Horizontale

- Ekstrema esperantisto
- Magiec' — Partet'
- Senvalora aŭ valorega cifere' — Ter' kun akvo
- Unua parto de la maldika intesto, tuj ekster la stomako
- Moviĝas antaŭen — Pentristo Salvador inverte
- Roma palaco, longtempe sidejo de la papoj (s.f.)
- Inklino — Sufikso por esprimi "laŭ la maniero, la similo de"
- Japana lud' kun E-sekcio — Varmigas manĝaĵojn
- Malnovaĝa

Vertikale

- Ege bonmaniera
- Antaŭulo de IKU — Duondion, heroon de la Ramajano, edzon de Sita
- Armeano
- Participa sufikso — Kondicionalo — Per tio komenciĝas la korelativaj demandovortoj
- Kondiĉe ke — Plej granda Esperanto-evento en la jaro
- Transitivo — Ĉiela — Romia 4
- Serviste (en restoracio)
- Rilata al afrika felisego — Pafstangot'
- Grek-rite kristana

anonctabulo

TARIFO: 0,50 gld. por ĉiu vorto. Tri internaciaj respondokuponoj por dek vortoj.


Tri 19-jaraj komencantinoj, studentoj pri la angla, deziras korespondi tutmonde:

- Bahar Tulabi, N-ro 41, Kazemian Lane, Alavi Str., IR-68146 Khoram Abad, Irano.
- Pupak Purniayi, No 135, Allah Lane, Sattarkhan Str., Bazarcheh Shahrđari, Enghelab Avenue, IR-68166 Khoram Abad, Irano.
- Mehrnush Omid-Ali, No 8, 5th Lane, Taleghani Str., Shahrak Elahieh, IR-67148 Kermaneshah, Irano.

27-jara fervorulo, abiturientiĝinta pri matematiko kaj licenciĝinta pri biologio (mikrobiologio kaj genetiko) deziras labori en iu ajn evoluinta lando. Scipovas la anglan, francan kaj lernas la germanan aŭtodidakte. Victor Nto-Nto, B.P. 4604, Douala, Kamerunio.

Se vi havas truon en via **KONTAKTO-kolekto** ankoraŭ restas (de pluraj n-roj nur unu!) ekzemplero(j) de n-roj **25, 28, 33, 35, 38-42, 45, 47-51/52, 53-54, 56-68: 1,50 gld.; 70-82, 84-87, 89-92, 94-109, 111-112, 114-119, 121-125/126: 1,00 gld.; 129-150: 4,00 gld.** Duoblaj n-roj: 50% pli. Rabato ekde 10 ekz.: 10%; ekde 20 ekz.: 30%. Aldoniĝas 10% por sendo kaj 6% por imposto en landoj de EU. Mendu ĉe UEA.

17-jara komencantino, studentino, deziras korespondi tutmonde: Sylvia Elisa Frizzo, Rua Barão de Aracati 644 Ap. 601, Meireles, BR-60115-080 Fortaleza - CE, Brazilo.




Archeon [arĥeon!] kuŝas sude de la urbo Alphen aan den Rijn [alfn aan den rejn]. Antaŭ ĉirkaŭ 15 jaroj ekestis plano konstrui parkon, en kiu la vizitantoj povos renkonti vivanta la nederlandan pasintecon. Ekde 1994 Archeon estas malfermita. Oni ne vidas malnovajn aferojn tie, sed novajn aranĝitajn laŭ malnovaj manieroj.

Urbeto el 1350 nomiĝas Gravendam [ĥrafndam]. Ĝi enhavas domojn de ŝuisto, bak*-isto kaj aliajn, kaj monaĥ*-ejon. Sed ne temas pri speco de muzeo: en la domoj vivas kaj laboras homoj. Tiuj "loĝantoj" klarigas al la vizitantoj sian okupon.


Simile okazas en la romia Traiectum ad Rhenum (traiektum ad renum), kie troviĝas templo*, ban-domo, pot-farejo kaj gastejo (tie oni povas ankaŭ manĝi). La prahistoriejo enhavas fiŝistan vilaĝon kaj aliajn kabanojn* kaj domojn por loĝi kaj labori, el diversaj epokoj.

En speciala parto de la parko oni havas "edukejon", kie senĝene de la ordinara vizitantoj, infanĝupoj pasigas la tempon en la pasinteco. Sed tio ne estas ĉio en Archeon!

Gladiatoroj estis batalistoj de Romo, kiuj amuzis la popolon. Tiuj ĉi gladiatoroj de Archeon salutas la urbestron.



Archeon




Ŝton-epoka fiŝista duopo

ANTAŬ LA KONSTRUO DE LA PARKO, la planantoj devis konsideri multajn faktorojn*: la parko devis esti sufiĉe proksima al trajnstacio, ne troviĝi ĉe industriejo, ne en-danĝer-igi la medion kaj vidaĵon, sed tamen esti en "Randurbaro", tiu parto de Nederlando, kie loĝas la plejparto de la popolo kaj al kiu apartenas ankaŭ Roterdamo.

Bedaŭrinde ne mankas problemoj. Kelkaj opinias, ke Archeon ne sufiĉe "vive" aspektas, ĉar la arĥeonanoj ne vere loĝas en la laborejoj, kvankam la ricevata bildo de la tuto bonas. Ĉu vere ĉiuj vestaĵoj devus esti mane teksitaj*? Tio estus en plena

Traiectum ad Rhenum, konstruita en 1993 p.K.



La estroj de la romia fako mem muzikas.



VIZITO AL LA PASINTECO

facila

- Teksto kaj fotoj de Marcus Sikosek, Nederlando

EN NEDERLANDO EKZISTAS PARKO VERŝAJNE UNIKA* EN LA MONDO: VI POVAS PASIGI TAGON EN LA PRAHISTORIO, EN LA ROMIAJ TEMPOJ KAJ EN LA MEZ-EPOKO*.

Marcus Sikosek, germano, studas historion kaj lingvistikon en Nederlando. Estrarano de GEJ, aŭtoro de *Proponaro por la Esperanto-informado* (serio Esperanto-dokumentoj).



Nuntempaj infanoj ĉirkaŭas mezepokan almozulinion.

En 1995 la aŭtoro stud-laboris en Archeon. Jen li kiel mezepokano.

konsento kun la historia vero, sed la kostoj estus simple ne-elten-eble altaj — kaj la plej multaj vizitantoj tamen ne rimarkus la detalon. Cetere, en la parko oni havas modernajn signalojn* pri tuj-elirejoj en kazo de danĝero, kio estas ne nur ŝtate devigita, sed memkomprenebla.

Stud-laborantoj, konatoj de la aŭtoro, ridetas por la legantoj de KONTAKTO.


La antaŭe priparolitaj kostoj konsistigas la plej grandan problemon: Archeon malsanas mone. La parko ja altiris 250 000 homojn en la sezono aprilo-oktobro de 1995, sed eĉ tio ne sufiĉas. Laŭ la planoj, devus esti la duoblo.

KIEL ATINGI PLI DA VIZITANTOJ? Ĉu el eksterlando? Belgio multe venas (ĉar Belgio ne multe pli malproksimas de Archeon ol ekzemple norda Nederlando), sed por aliaj la vojo estas multe pli longa. La plej multaj francoj kaj germanoj loĝas tro malproksime por nur unutaga vizito, kaj britoj povas atingi Nederlandon nur ŝipe aŭ fluge aŭ per la malproksima brita-franca tunelo* ĉe Calais [kale’].

Alia problemo estas, ke multaj homoj ne sufiĉe bone povas memstare sperti la parkon. Archeon ja konscie* malhavas muzeajn klarigetojn, ĉar klarigi estas la tasko de la arĥeonoj. Tial oni planas enkonduki pli da “gvido” tra la parko krom la kutimaj rondgvidadoj.

Sed la kunlaborantoj de Archeon bone scias, ke tiom juna parko tiom neordinara certe havas problemojn en la komenco. Planoj, en- kaj elspezoj, dis-vastiĝo, labor-metodoj, firma interna gvido (Archeon estas privataĵo) — ĉio tio ankoraŭ bezonas multe da pripensoj.

“En Archeon la pasinteco venas tre proksimen” diras la frap-frazo. Se vi foje vizitos Nederlandon, eble vi volos mem sperti tiun ĉi unikan parkon por kompreni aliajn popolojn — ne nunajn, sed pasintajn. □



La mezepoka Gravendam en printempo.

baki: kuirĵo per varmigo, ekz. panon
epoko: historie aparta jar-aro
faktoro: gravaĵo
kabano: tre simpla dometo
konscii: bone scii, kio okazas
monaĥo: ano de religia grupo
privata: propra de iu posedanto

signalo: komunik-signo
teksa: kunmeti fadenojn por fari vestaĵojn
templo: konstruaĵo por la servo de dio aŭ diino
tunelo: subtera tra-ir-ejo
unika: sola, sen-egala

Plej efika lingvometodo

— May Bijleveld, Brazilo

Ĉu ekzistas unu plej efika metodo lerni lingvon?



FRANÇO VÉLTHEY

Komparante naciajn lingvojn kun Esperanto, ni vidas kiel la plej gravan diferencon: En la unuaj grandan kvanton da reguloj, kiun la lernanto ne povas libere apliki sen la kono de multegaj esceptoj, kaj en Esperanto malmultajn regulojn, kiujn li povas ĉiam apliki laŭ sia volo.

Tial la reguloj en Esperanto estas por la lernanto interesa ludilo, kiun ni devas ne malhavigi al li, dum la reguloj en naciaj lingvoj povas prezenti veran koŝmaron.

Konsiderinda faktoro estas ankaŭ la celo de la lernado: kiel la lernanto(j) volas uzi Esperanton post la kurso?

En Eŭropo pro la multaj lingvoj, kiuj okupas malgrandajn regionojn, la celo de Esperanto estas ĉefe paroli. Kontraŭe, en Sudameriko ekzistas nur la similaj in-

ter si portugala kaj hispana, se ekskludi la indiĝenajn lingvojn, ĉar tiuj estas uzataj nur en la triboj. La indiĝenoj, kiuj regule kontaktas blankulojn, parolas ilian lingvon. Admirinde, ĉu ne? Do, por internaciaj kontaktoj ene de Sudameriko neniu sentas la neceson de alia lingvo — nur malmultaj sudamerikanoj transiras la oceanojn. Tamen ili ne volas izoli sin sed amikiĝi kun malproksimaj alilandanoj. Tial, kiam ili lernas Esperanton, ilia celo estas ĉefe korespondi kaj legi alilandajn librojn kaj revuojn.

Pro tio al pluraj instruistoj plej gravas la instruado de legado, skribado kaj tradukado. Ĉu tial la instruado devas esti unue kompreniga, ne paroliga? Aŭ ĉu ekzistas aliaj konsiderendaj faktoroj?

Kiam ni parolas pri iu aŭ io bone konata, ni mense vidas la koncernen personon aŭ objekton. Nia cerbo havas imagkapablon. La samo okazas, kiam aliaj personoj parolas pri iu aŭ io. Ni vidas interne, kion niaj fizikaj okuloj ekstere ne vidas.

Kiam ni memoras iun grandan bruon, kiu okazis ankaŭ kelka

tempo, ni mense aŭdas tiun bruon de nove, sed niaj fizikaj oreloj aŭdas nenion. Same, kiam iu volas eltrovi alian tekston

La elekto de metodo por instrui lingvon dependas de:

- 1) la karaktero de la lingvo,
- 2) la lingvokono de la lernanto kaj lia kapablo lerni
- 3) la daŭro de la kurso,
- 4) la kvanto da lernontoj;

kaj, por unuopa lernanto:

- 5) la celo por kiu li bezonas la lernotan lingvon
- 6) la tempo, kiun li disponas por lerni la (por li) necesajn lingverojn.

por konata melodio, li povas mense kanti tiun melodion por trovi novajn vortojn. Do, nia cerbo havas vidan kaj aŭdan imagkapablon. Tia estas nia imagkutimo. La samo povas okazi kun flaro kaj gusto, sed eble ne tiel klare. Beethoven dum sia juneco ne estis surda, sed poste, malgraŭ sia surdeco, li komponis, ĉar mense li aŭdis siajn novkreitajn melodiojn.

Kiam ni legas, ni transformas la videblajn literojn en vortojn, kiujn ni mense aŭdas — ĉar, antaŭ ĉio, lingvoj estas muziko. Infanoj lernas paroli aŭskultante la sonon de la lingvo, kaj imitas tion. Surdaj beboj nur rigardas la buŝon de la familianoj, sed ne aŭdante la sonon ili ne lernas paroli. Ĉiu vorto unue reprezentas sonon. Ĉiu frazo reprezentas melodion. Nur la sono donas vivon al la lingvo. Kiu lernas fremdan lingvon el libroj sed neniam aŭdas ĝin, imagas la prononcon laŭ sia propra lingvo, sed tute certe eraras.

Lingvo ne estas aro da videblaj literoj. Lingvo estas aro da sonoj. La unua memoro fiksas aŭdante la sonon. Ĉe tiuj, kiuj jam scias legi, la dua memoro fiksas

UEA reeldonis la bazan gvidilon por instruantoj de la internacia lingvo:

metodiko de la esperanto-instruado

de Rudolf Rakuša (1893-1970)



Temas pri 3-a eldono de la verko unue aperinta en 1957 kaj kompletigita en 1970. 189p. 20cm. ISBN 92 9017 045 X. Prezo: 15,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj. Havebla ĉe UEA.

la vorton rigardante la skribmanieron. La dua helpas la unuan, sed neniam povas agi sola.

Antaŭ 70 jaroj en Nederlando oni jam akceptis la aksiomon “Unue aŭdi, due bone prononci, poste legi kaj skribi”. Ni lernis la anglan komencante per tre simplaj frazoj skribitaj en fonetika ortografio. Flanke estis la nederlanda traduko en normalaj literoj. Tutan libron ni tralaboris tiamaniere, ĉiam kun pli komplikaj frazoj kaj pli granda vortaro. La instruistino parolis kaj prononcis tre bone la anglan kaj ŝia konstanta kontrolo estis pri la elparolo kaj la intonacio. La dua libro donis la saman tekston, sed normale (laŭ angla vidpunkto) skribitan. Nur tiam ni lernis skribi la lingvon, kiam ni jam parolis. La tria libro klarigis la gramatikon analizante tion, kion ni jam kapablis diri.

Ankaŭ en Rio-de-Janeiro en lingvo-instituto, kie mi instruis, oni uzis unue la fonetikan ortografion kaj ne tuj montris la anglan skribmanieron pro la danĝero, ke la lernantoj inventos eraran prononcon. Tiel la nova lingvo ekvivas en la oreloj de la lernantoj.

Se iu povas legi kaj skribi sed ne parolas, li ne aŭdas mense, kion li legas kaj skribas. Tiam la lingvo estas nur senviva aro da nigraj signetoj. Kiel li povas meti siajn sentojn en sensonajn, nur videblajn literojn? Kiel pruvon, ke tiu instrumentado estas tre efika, mi rakontos ion, kio okazis al mi en Anglujo:


En trajno mi estis parolanta kun angliano jam dum duonhoru. Subite ŝi parolis pri lokaj cirkonstancoj pri kiuj mi sciis nenion. Do mi diris: “Mi ne loĝas en Anglujo — mi estas nederlandano.” Ŝi ege miris: “Ĉu vi ne estas angla???” Tio okazis ne ĉar mi estis pli inteligenta ol aliaj eksterlandanoj, sed pro la instrumentario, kiun mi profitis.

Konkludo: La lernantoj unue alproksimiĝu al fremdlingvo aŭdante kaj ripetante sub severa kontrolo de la instruisto, kiu devas havi bonan aŭdkapablon. Oni klarigu gramatikaĵojn nur kiam la lernantoj alkitimiĝis al la muziko de la lingvo.

Instruante Esperanton la instruisto povas klarigi la unuajn gramatikajn regulojn, sed estas pli interese, se la lernantoj mem malkovras tiujn regulojn per la donitaj ekzemploj. Ili estos pli fieraj pri si mem kaj tial ne forgesos la regulojn. Post tio ili povos inventi siajn proprajn ekzemplojn.

Kiu studas muzikon devas praktiki per instrumento, ekzemple piano. Por paroli ni bezonas alian instrumenton: la buŝon. Do ni praktiku nian instrumenton ĉiutage, en laŭta voĉo. Andreo Cseh diris: “Se vi havas neniun al kiu vi povas paroli por praktiki la lingvon, parolu al via hundo aŭ kato.” Kaj kreu mense videblaĵon de tio pri kio vi parolas. Pensu en la nova lingvo, mense ĝin ankaŭ aŭdante. □

sciujo



Kial Dolomitoj aspektas rozkoloro?

— Giancarlo Baraldi, Italio

Ekde la antikveco la loĝantoj de la alpaj valoj estis mirigitaj de la stranga rozkoloro de iu parto de tiu montaro — la parto kiun ni hodiaŭ nomas Dolomitoj aŭ Palaj Montoj en la itala teritorio. Antaŭ 2000 jaroj komencis aperi legendoj pri la tiel nomata “vivanteco” de tiu ĉeno. Fakte, multajn jarcentojn poste oni malkovris, ke Dolomitoj naskiĝis rekte de la marfundo, en tropika medio, dank’ al la konstanta ago de mikroorganismoj kaj konkoj. Do, fiŝoj kaj maraj estaĵoj sukcesis krei veran montaron, kvazaŭ ĝi mem estus giganta fiŝo! Lastatempe svisaj sciencistoj, farante eksperimentojn en brazila tropika medio, malkovris kombinon de du kemiaj elementoj sub la influo de malgranda bakterio, kiu ebligas la kreadon de rozkoloraj kristaloj.

Ekzistas do pruvo pri la verŝajneco de la antikvaj legendoj. Tio estas grava paŝo en la malrapida sed senĉesa konatiĝo kun nia mondo. □

Alain Fournier

La granda Meaulnes

Fama priskribo de pura amo.
La sola verko de la aŭtoro,
kiu mortis nur 27-jara.

El la franca trad. Roger Bernard. Rotterdam/La Laguna: UEA/J. Regulo, 1988/1975 (eldono/preso). 222p. 21cm. Belliteratura serio 32. Prezo: 22,50 gld.

“Zuna estas la plej bela en la mondo.” Tiel asertis ĉiuj ŝiaj samvilaĝanoj kun fiera mieno.

Zuna vivis en la aĝo de plena florado. Antaŭe la bela knabino lernis du jarojn en elementa lernejo. Ŝi tre enviis la klerulojn kaj interesiĝis pri tagnotoj. Ĉiuvespere, en sia silenta dormoĉambro, Zuna kun kuntirataj brovoj jen pensis, jen skribis tagnotojn.

Kontraŭ la vilaĝo sidis ĵus ekfunkciigita elementa lernejo. Ĝi adaptiĝis el templo. Antaŭe en ĝi vilaĝanoj prezentis oferaĵojn al siaj prapatroj kaj preĝis al Dio.

En la lernejo instruis nur unu instruisto, nomita Tom. La junulo kun okulvitroj estis 20-jara, ĵus diplomiginta en normala lernejo. La eleganta instruisto, kiel ĉiuj aliaj kleruloj, ĝuis grandan respekton de la vilaĝanoj.

Iufoje, post kamplebora, Zuna lavis sian vizaĝon ĉe rivereto,

Kaj Zuna trovis ŝancon starigi interrilaton kun la instruisto. La bela knabino petis la helpon de sia frateto, ke li transdonu dek zongziojn al la eleganta junulo.

Post la foriro de sia frateto, la belulino maltrankvile staris ĉe la pordo de sia ĉambro por atendi la revenon de la knabeto. Sed, kiam ŝia frateto

Post reciprokaj salutvortoj, Zuna pete demandis: “Ĉu vi povus korekti erarojn de miaj tagnotoj? Jen mia taglibro!” La instruisto varme kaj afable akceptis ilin, kaj ankaŭ ŝian taglibron.

Dum la instruisto atente legis la taglibron, Zuna balais la ĉambron per siaj grandaj okuloj. Multaj libroj jen sidis jen kuŝis en la ĉambro.

Zuna

— Ba Yankui, Ĉinio



ANNA RACHON

kiu apartigis la vilaĝon kaj la lernejon. Poste ŝi forigis la akverojn de sur la vizaĝo per sia jupo. Ĝuste tiam la instruisto estis ĉe la alia bordo de la rivereto kaj klare vidis ŝian agon, kio hontigis la belan knabinon. Feliĉe, la knabo estis ĝentila kaj reagon ne faris. Tio en ŝia kapo naskis novan ideon: konatiĝi kun la elementa instruisto.

La Drakboata Festo¹ venis. Kutime, ĉinaj virinoj preparas zongziojn² por celebri tiun feston. Kaj tiuj faritaj de nia ĉef-rolulino estis belformaj kaj bongustaj. Ŝi bone sciis, ke Tom vivas vivon solecan kaj senhelpan en la lernejo.

transiris la ponton super la rivereto, io interesis la petoluleton kaj li haltigis siajn paŝojn por pririgardi. Zuna laŭte kriis: “Frateto, venu por helpi min!”

Post la reveno de sia frateto, la junulino demandis per milda voĉo:

“Ĉu vi vidis instruiston Tom?”

“Jes.”

“Kion li diris?”

“Nenion”

“Ĉu vi diris, kiu petis vin tion fari?”

“Mi diris, ke mia fratino”

La vangoj de la bela knabino ruĝiĝis kaj ŝi ĝoje diris per dolĉa voĉo: “Kiu permesis al vi eldiri la veron? Mi ne bezonas vian helpon. Foriru ludi!”

La knabeto tute ne komprenis, kio okazas al lia fratino.

Noktiĝis. La luno ridetis sur la ĉielo. Zuna petis sian frateton kuniri viziti la lernejon, ĉar ŝi sentis honton, se ŝi sola vizitus fraŭlon.

Post tralegado de la taglibro, la junulo diris: “Viaj tagnotoj ne elmontras sian ĉeftemon, tial ili similas al sensignifaj skribaĵoj.” Zuna ŝajnis esti kompreninta kaj kapjesis. Post interparolo pri aliaj bagatelaj aferoj, kun sia frateto ŝi iris for.

Instruisto Tom donis al Zuna tian impreson, ke li multe fumas, ĉar lia cindrujo estis plenplena je cigaredetoj. Ŝi opiniis, ke oni bezonas fumi dum pensado aŭ skribado, tial ŝi aĉetis multe da cigaredoj kaj donacis ilin al la elementa instruisto por danki lin. Ŝi opiniis, ke ŝiaj cigaredoj certe ĝojigos la junulon, sed Tom dankan vorton ne diris pro ŝia granda donaco kaj nur ridetis, ĉar li ne fumis.

Poste, ŝi multfoje vizitis la lernejon, tamen ĉiam kune kun sia frateto.

Ŝiaj tagnotoj pliboniĝis tagon post tago. Unu el ili eĉ publikiĝis en la lite-

En januaro 1813 la rusa caro* Aleksandro la Unua anoncis konkurson* por trovi la plej bonan projekton de popola templo. La templo celis signi la kuraĝon de la rusa popolo en la milito kontraŭ Napoleono. Venkis la projekto de arkitekto* Aleksandro Vitberg, kiu proponis konstrui grandan palacon*, kiun ĉirkaŭbraku kolonoj* el 600 trofeaj* kanonoj*. En oktobro 1817 la templo estis fundamentita* sur Vorobjov-Montoj en Moskvo.

Tamen, ĝis 1825 la konstruado iris tre malrapide. Ankaŭ multaj trofeoj estis ŝtelitaj, tiel ke ĉiuj laboroj devis halti.

Nova caro Nikolao la Unua daŭrigis la konstruadon en 1832. Nun la templon oni komencis konstrui sur loko apud la rivero Moskvo. Tiun ĉi lokon delonge oni opiniis aĉa: Antaŭ multegaj jarcentoj sur ĝi staris pagana* templo, kiun la unuaj kristanoj ruin*-igis. Post tio paganaj pastroj* malbenis* la lokon de ilia iama templo kaj post ili kristanaj pastroj dufoje malbenis la lokon, kiun ili nomis "Malafabla marĉo*". La konstruado finiĝis nur en 1883.

La pastra deziraĉo realiĝis en la 20-a jarcento, ĝuste trifoje. Unue, kiel mi priskribis enkonduke, sen postsignoj foriĝis la Templo de Jesuo la Savanto. Poste oni ne sukcesis konstrui, sur la sama loko, la "projekton de la jarcento": 300-metran Palacon de Sovetoj. Kaj fine fermiĝis la naĝejo Moskvo, konstruita anstataŭ la Palaco de Sovetoj.

Moskva urbestro Jurij Luĵkov nuntempe ne timas la malbenojn kaj fine de septembro 1994 ekkonstruis la novan Templon de Jesuo la Savanto. Post unu jaro, je la 850-a dat-reveno de Mosko en 1997, oni planas fini la konstruadon.

Laŭ la opinioj de modernaj arkitektoj oni ne sukcesos rekonstrui tute la saman templon, kiu staris tie en la 19-a jarcento, ĉar forestas certaj bildoj kaj priskriboj de la preĝejo.

Estante, kiam la templo estos preta, 6500 homoj povos samtempe preĝi en ĝi. La tuto kovros 3980 kvadratajn metrojn.

Bonokaze, la konstruado de la templo nun frostigis tiun de Moscow-City — infana parko same granda kaj interesa kiel Disneyland, kaj la rekonstruon de Granda Sportejo Luĵniki. □

ratura revuo de ŝia gubernio. Ŝiaj samvilaĝanoj laŭdis Zunan, ke ŝi estas promesplena.


Surprize por la bela knabino, la elementa instruisto transposteniĝis.

Antaŭ lia foriro, ŝi, nur ĉi-foje sola, vizitis la fraŭlon. Zuna apogis sin al la pordo kaj rigardis la instruiston pakantan. Ŝi demandis: "Instruisto Tom, ĉu vi transposteniĝas?"

"Jes. Persistu en la skribado de tagnotoj!"

"Kiu korektos miajn erarojn?"


"Certe venos nova instruisto."



facila

— Irina Aleksejeva, Rusio

La konstruado rapidas sekvante ankaŭ fotojn de la malnova templo.



En hodiaŭa Rusio tio, kio estas konstruita devas esti detruita* kaj tio, kio estas detruita, devas esti re-starigita. Nun la moskva urb-estraro rememoris pri ĉef-templo*, kiu estis eksplodigita* la 5-an de decembro 1931: la Templo de Jesuo la Savanto.

arkitekto: planisto kaj estro de konstruado
caro: ŝtatestro de slavaj landoj en malnovaj tempoj
beni: grave alvoki dian bonvolon sur iun aŭ ion
detru: malkonstrui; malfari per forto
eksplo: forte, brue kaj dis-salte rompiĝi
fundamento: starigaĵo en la tero, por servi kiel bazo al konstruo
kanono: metala milit-ilo, kiu brue el-ĵetas *eksplo*-aĵojn
kolono: staranta aĵo, kiu subtenas konstruaĵon

konkurso: antaŭaranĝita "batalo" kun juĝantaro, reguloj kaj premioj
marĉo: ujo de senmova akvo kun mola tera subo
palaco: granda riĉa domo de gravulo aŭ reganto
pagana: ne kredanta je unu-nura kaj persona Dio
pastro: homo, kiu gvidas religian servon
ruino: restaĵo de malkonstruo
templo: konstruaĵo por la servo de dio aŭ diino
trofeo: "memoraĵo" pri la sukceso super la venkita malamiko

13

"Ĉu vi revenos?"
 "Se mi havos liberan tempon, mi volas reveni, ĉar tie ĉi belas montoj, arboj kaj ankaŭ la homoj."
 "Sed mi... a mia... frateto..."
 "Ho!"
 "Ĉu mi povas revidiĝi kun vi estonte?"
 "La mondo estas tre, tre granda. Kie vi povas trovi min?"
 Ŝi komencis murmure fabriki dolorajn larmojn pro malespero kaj malĝojo.
 Ŝia ago surprizis la instruiston, kiu

demandis, kio okazas al ŝi.
 La bela junulino respondis, ke iu insektaĉo mordis ŝin. Kaj ŝi tuj forkuris sen adiaŭa vorto.
 Instruisto Tom foriris. Al la lernejo venis maljunulo kiel instruisto por anstataŭi la junulon.
 Pli poste Zuna edziniĝis. Eksteratende, ŝia edzo estis malbela variolulo.
 — Trad. Xu Jinming, Ĉinio

1. Festo ĉiujare celebrata la kvinan tagon de la kvina monato laŭ la ĉina kalendaro.
 2. Manĝaĵo farita el gluecaj riz-eroj kun jujuboj kaj aliaĵoj, pakita en fragmitaj folioj.

KSTIAO n-ro 151 (1996:1)

Bela granda Esperanto-flago

Ĝis nun oni kutime proponis nur flagetojn. Nun finfine estas mendeblaj ankaŭ belaj grandaj flagoj en la formato 100cm x 150cm el centprocenta kotono, kun koloroj permesantaj normalan lavadon. Prezo kun sendokostoj nur 1600 BEF. Mendu nun rekte ĉe

Librovendejo **KARILJONO**

Doornstraat 22, BE-2610 WILRIJK, Belgio
Tel. + fakso: +32 3 827 24 05
retpoŝto: esperanto_kariljono@msn.com
MSN-membroj: esperanto-kariljono



Ni volonte akceptas ankaŭ:



Alphonse Daudet: Tre mirigaj aventuroj de TARTARIN DE TARASKONO

La Libroservo de UEA ankoraŭ havas kvanton de tiu ĉi humura majstroverko!

192 p., tole bind., ilustr. 18 gld., triona rabato ekde 3 ekz.



Antaŭ pli ol 150 jaroj natursciencisto Charles Darwin [ĉarlz darŭjn] vizitis Galapagajn Insulojn*, kien al-portis lin rakontoj pri mir-indaj bestoj, kiuj ne ektimas, kiam oni al-proksimiĝas. Liajn voj-malfermajn teoriojn* pri evoluo* kaj natura selektado*, kiujn li pri-skribis en sia libro *La origino* de la specioj**, plifortigis liaj studoj dum la vizito al tiu ĉi insul-aro, kiu aperis de sub la maro antaŭ kvar milionoj da jaroj. Galapagoj povas montri multajn tre apartajn speciojn lokajn, kiuj evoluis en tiu solega loko tra la jar-centoj.

Sed kiajn ŝanĝojn ununura jarcento povas fari! Dum la vizitantojn oni zorge kontrolis kaj Ekvadoro protektas* 97 elcentoj de Galapagoj kiel nacian natur-parkon*, la kreskado de urbecaj ejoj kaj eniroj de la homo endanĝerigis la rimarkindan evoluadon de la insularo. El la 14 subspecioj de gigantaj* testudoj*, kiuj iam libere vivis tie ĉi, tri malaperis, kaj la aliaj estas en danĝero. Ankaŭ multaj aliaj bestaj specioj kaj kreskaĵoj estas en la danĝer-listo.

Ne mirige do, ke kiam ek-estis fajro antaŭ du jaroj sur insulo Isabela, kiu endanĝerigis la vivejon de du maloftaj sub-specioj de gigantaj testudoj, aŭdiĝis helpo-peto. "Savi* ilin necesegis", diras loĝanto Mario Salzmann, kiu laboras ĉe la Programo de Unuiĝintaj Nacioj por Disvolvigo (PUND) en Ekvadoro. "Ilia nombro* jam tiel forte malgrandiĝis, ke protekti la malmultajn, kiuj restas, estas nia devo".

fakto

Misio en



Ankaŭ la galapaga testudo* povas malaperi.

Por savi la testudojn de la fajrego kaj fi-kaptistoj, kiuj trovas ilian viandon tre-ege bongusta, PUND donis monon el sia fako por danĝeraj okazoj por helpi ebligi la aperon de "Misio* Ninja". La agado kun-

La bona ingo



Ĉu **KONTAKTO** plaĉas al vi?

Se jes, ne kontentiĝu legi la ekzempleron de via klubo aŭ instruisto – abonu ĝin mem! Se vi estas kursgvidanto, faru kolektivan abonon kun 20% rabato por via lernantaro (sufiĉas nur 6 ricevantoj). Se ni sendas ĉiujn ekzemplerojn en unu pako al unu adreso, la rabato estas 40%! Kaj, se temas pri grandaj grupoj, ni povas interkonsenti eĉ pri pli favoraj rabatoj! Skribu al ni!


ABONTARIFO 1996

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	125 frankoj	Nederlando	41 guldenoj
Aŭstrio	245 ŝilingoj	Germanio	37 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	765 frankoj	Hispanio	2300 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilio	20 guldenoj	Israelo	32 guldenoj	Portugallio	2500 eskudoj
Britio	16 pundoj	Italio	34000 lirej	Svedio	185 kronoj
Danio	150 kronoj	Japanio	2880 enoj	Svislando	31 frankoj
Finnlando	115 markoj	Kanado	31 dolaroj	Usono	23 dolaroj

tre
facila

Galapagoj

— Sid Kane



igis la militistan forton de Ekvadoro, la prezid-grupon de Galapagoj, Uneskon kaj la Servon de Naciaj Parkoj en tio, kio ŝajnis esti sav-misio por montri en televido.

Oni levis kaj trans-portis la testudojn per helikoptero* al loko en la apuda Puerto Villamil, kie oni nun plu vivigas kaj kreskigas ilin. Entute nur 14 testudojn oni trovis, kio klare montras la grandan danĝeron, sub kiu ilia ekzisto troviĝas.

“Nur ĉar ni inter-venis,” diras Salzmann, “la testudoj saviĝis.” “Kio estas grava nun,” li aldonas, “estas kreskigi la konscion* kaj la necesan politikan* volon por certigi, ke tiujn ĉi testudojn kaj aliajn tre apartajn speciojn en Galapagoj, ni ne perdos por ĉiam.”

(El CHOICES, revuo de PUND)

- danĝero:** proksima ebleco de malbono, malfeliĉo, perdo
- evoluo:** iom-post-ioma laŭ-natura dis-volv-iĝo kaj ali-formiĝo
- giganta:** ekster-ordinare granda
- helikoptero:** flugmasino, kiu povas pendri en la aero
- insulo:** ter-peco, kiun ĉirkaŭas akvo
- konscio:** klara scio pri siaj agoj
- misio:** grava far-enda devo
- natur-parko:** regiono, kiun protektas la ŝtato, por ke bestoj kaj kreskaĵoj povu libere vivadi
- numero:** multeco
- origino:** tio, de kio io *evoluis* kaj dis-volv-iĝis
- politiko:** arto aŭ scienco regi ŝtaton
- protekti:** zorgi de malbono
- savi:** liberigi de *danĝero* aŭ morto
- selekti:** elekti kun la celo plibonigi *specion*
- specio:** aro da kreskaĵo aŭ besto, kies membroj naskas inter si
- teorio:** tutaĵo de opinioj pri unu temo
- testudo:** besto kvar-pieda, kiu portas eksteran malmolaĵon
- volvi:** ĉirkaŭmeti ion en alian aferon

Libro

Du novaj serioj

La Imperio Ornaks.

A. Thorkent. Trad. Liven Dek. Santander: Grupo Nifo, 1995. 96p. 17cm. Serio *Future*. Prezo: 9,00 gld.

Miguel Gutiérrez Adúriz, eldonisto de la *Sferoj*-kolekto, decidis ampleksigi sian scienc-fician libro-oferton per du novaj serioj: *Orbito nula* kaj *Future*. La unua konsistas nur el tradukitaj rakontoj, komplemente al *Sferoj*, kiu de nun prezentos nur originalaĵojn. La dua celas ŝatantojn de aventur-noveloj tute senprentendaj kaj sufiĉe longaj por ampleksi unu volumeton; alivorte, ĝi adre-siĝas al trajn-literaturemuloj serĉantaj puran distron kontraŭ minimuma prezo: ja ne multaj publikigaĵoj en la Libroservo de UEA kostas malpli ol naŭ guldenojn.

La Imperio Ornaks estas la unua ero el la *Future*-serio, en formato iom malpli granda ol tiu de *Sferoj* kaj kun eksteraĵo almenaŭ same loga, afero ne bagatela por disvendi subbelettran verkon.

Stilaj nuancoj apenaŭ gravas ĉi-verke: ĉiuj roluoj skize karakteriziĝas kaj tuj diras sian direndon per viglaj kaj abundaj dialogoj, kiel konvenas en scienc-fikcio. Fakte la tuta intrigo teksiĝas per


dialogoj dum la agado rapide antaŭeniras tra jena enhavo: iuj ornaks'aj potenculoj dungas aventuriston kapablan modli sian vizaĝon por ŝajnigi sin la Ter-ambasadoro en la planedo Ornaks. Tie li devos senmaskigi roboton rolantan kiel imperiestron. Tamen la afero komplikiĝas multe pli ol antaŭvidite dank' al neatenditaĵoj kaj diversaj efektoj: ja la ŝatantoj de la ĝenro legos ĉi-novelon unutire. Kompreneble, multaj koincidoj helpas la ĉef-rolulojn kaj kondukas al nepre feliĉa fino. Aktualas — kaj ŝajne ĉiam aktualas — la diro de l' poeto: “Do, kara, se vi plaĉi havas emon, al la legantoj donu grasan temon, tumulton kaj sekreton kaj implikon

revolverpafon aŭ ponardo-pikon, kaj ankaŭ pri la amo, sur la sceno okazu multa kuro, movo peno. Se vi, je l' fino, eble plej naive, la grandan Nodon solvos detektive, eĉ krom ĉi tio, ankaŭ Li Ŝin havos, mi estas certa, ke vi ĉiujn ravos.”

Unu fina kritiko: la kutime alta lingvonivelo de la tradukinto ial sobiris, ŝajne pro

hasto: ja traduk-arto postulas malrapidan kaj zorgan laboron, kion Liven Dek tre bone scias. Temas nur pri makuletoj, sed ili vere ĝenas iom postuleman legadon. Espe-reble tamen, tiu lingvo-pekemone infektos la venontajn volumojn de la serio *Future*, kiu ja meritas plej brilan — futuron.

Antonio Valén, Hispanio



Ame kaj klere verkita klasikaĵo: Vivo de Zamenhof

(1920)

de Edmond Privat

134 p. 18 cm. Bind. 18,90 gld. Triona rabato ekde tri ekz.

ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu internacian respondkuponon, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. *KSM* pludonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. *KSM* estas servo de UEA.



Koresponda Servo Mondskala
B.P. 6
FR-55000 Longeville-en-Barrois
Francio

recenzomanio

15

n-ro 151 (1996:1)

OFIATSKA

